

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Aristóphio Alves Filho

Monique Arnaud

Christian Degiorgi

Mireille Grosjean

Vasil Kadifeli

Dennis Keefe

Katalin Kováts


Stefan MacGill

Alessandra Madella

Radojica Petrović

László Szilvási

Zlatko Tišljar



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Mireille GROSJEAN: <i>ILEI 70-jara</i>	4
Dennis KEEFE: <i>UNESKO-Kuriero en EO kiel baza kursomaterialo</i>	7
<i>Mikrokosmo & Makrokosmo: naturo kaj homeco</i> (Christian DEGIORGI).....	14
<i>ILEI agadas ĉe UNESKO.</i> (Monique ARNAUD).....	16
Zlatko TIŠLJAR: <i>Novtipa enkonduka lernobjekto [...] (Multlingva Akcelilo)</i>	18
Katalin KOVÁTS: <i>Freŝaj informoj pri la KER-ekzamenoj</i>	20
Katalin KOVÁTS: <i>Ekparoligu viajn kursanojn per Ekparolu!</i>	22
El la landoj kaj sekcioj (IN, BR, CN, HU, TR)	24
La 52-a Kongreso: feste, fake kaj distre (Radojica PETROVIĆ)	30
La ĉefaj EO-eventoj de la jaro 2019.....	35
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	35
Adresaro de la Sekciestroj, Reprezentantoj, Kontaktpersonoj	38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

Vicprezidanto: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.

Estrarano pri financaj aferoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Vic-prizorganto de financaj aferoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>

Estrarano pri Kongresoj: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>.

Estrarano: JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, Asahicyou-3, Kawagoe, Saitama JP-350112, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, asistanto en kongresaj aferoj, TEJO.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/ Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: UNESKO-Kuriero
en EO kiel baza kursomaterialo (*vd*
la artikolon de D. Keefe sur p.7)

Sur la dorskovrilo: Centra placo de
Ĉaĉak + Meandroj de la rivero
Okcidenta Moravo, unu el la
kongresaj ekskursceloj (Fotis Dejan
Živković, Turisma organizaĵo de
Ĉaĉak)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Jen 2019, jen 70-jariĝo de ILEI! Do ni havos por festi. La estraro pripensas diversajn agadojn kaj nia 52-a Kongreso en Ĉaĉak, Serbio (RS), kompreneble estos okazo por celebri, memori kaj plani. La unua paŝo estis havi emblemon. La estraro ricevis diversajn proponojn kaj voĉdonis pri tiu ĉi, verko de nia plurtalenta estraranino „Unika”.



Jam en tiu ĉi numero aperas esploroj pri la pasintaj jaroj kaj analizoj pri la irita vojo. Tra la jubilea jaro nia organo IPR prezentos al vi pliajn tekstojn por malkovri la valorajn gvidantojn de nia Ligo kaj la epokfarajn eventojn, kiuj aperis tra la jaroj. Tiuj pripensoj sprunu nin al pli arda kaj efika laboro !

Se vi havas emon verki pri via ligo al la Ligo, bonvole sendu vian kontribuon al la redaktoro, nia kara Jozefo Nemeth, kiu en 2019 festos ankaŭ sian centan IPR-numeron.

Mi deziras al vi agrablan legadon !

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

ILEI 70-jara

de Mireille GROSJEAN, prez. de ILEI ekde 2013 (Svislando)


En la jaro **1949** fondiĝis **nia Ligo ILEI**. Nia baza strukturo kun sekcioj kaj reprezentantoj estis tiam elpensitaj kaj nun plu vivas kaj efikas. Aldoniĝis kontaktpersonoj, kiuj ne aperas en nia statuto, ne ankoraŭ? En la fondoĵaro la mondo estis komplete alia: la instruistoj skribis sur nigra tabulo, lernantoj kopiis, vivantaj lingvoj estis lernataj same kiel la latina aŭ la greka. Estis lernolibroj, sed mankis fotokopiiloj, ne estis registriroj kun laŭparolilo, ne estis la Reto, nigraj-blankaj bildoj aŭ desegnaĵoj povis aperi, sed koloraj apenaŭ... Kaj nun en 2019: al kiaj taskoj pretiĝu instruisto? Al akompano kaj konsilado de memlernantaj studentoj. Per kiuj iloj laboru instruisto? Per filmetoj, rolludoj, koloraj skribiloj, komputiloj, telefonoj. Alia mondo!!

Antaŭ ILEI ekzistis **Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj TAGE**. Fondoĵaro: 1924. Ĝi funkciis ĝis 1936, sed la diktatoroj ne ŝatis EO-n, kiel vi scias. Tio vokas komparon en mia menso: unue ekzistis la Ligo de Nacioj (1920-1946). Poste aperis Unuiĝintaj Nacioj en 1946.



Se ni volas pensi pri tiuj komencaj jaroj, ni bezonas fontojn. Unue mi iris al „Historio de UEA”, de Ziko van Dijk, por trovi mencion pri la interkonsento inter UEA kaj ILEI pri delegado de la instrutasko al ILEI. Tamen tiu libro (eldonejo Espero, aperjaro 2012) ne mencias la Ligon ILEI. Laŭ la indekso ĝi aperas nenie en la libro. Mi akiris kelkajn dubojn pri la eblo trovi ion en la indekso, kiam mi legis en alfabeto ordo post Hungario Chagnoux, Chandra, Chaves, Chavet, Chevreux, Ido krizo... (paĝo 366)

Feliĉe la fonto „*Esperanto en Perspektivo*” (EeP) de Ivo Lapenna, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro (1974) estas pli informriĉa: fine de la Unua Parto, nomita „Esperanto kiel solvo de la lingva demando en mondaj kadroj”, aperas ĉapitro 4 „Instruado de Esperanto” el 44 paĝoj (65 ĝis 109).



En tiu libro ni malkovras, ke la organo **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)** estas pli malnova ol la Ligo mem. Jam en 1908 ĝi aperis, lanĉita de franca instruista grupo. Kaj ni malkovras multon pli.

Tutkomence

Ni komprenas el tiu verko de Lapenna, „*Esperanto en Perspektivo*” (EeP), ke homoj lernis Esperanton antaŭ ol naskiĝis lernolibroj. Ili mem lernis el la „*Unua Libro*”.

Poste aperis etaj lernolibroj kun la nomo „*Ŝlosilo*” de Herbert Höveler (1905). El EeP: „4.2. „*Ŝlosiloj*”. Temas pri malgrandaj libretoj, kiuj enhavas la bazajn regulojn de la gramatiko kaj radikaron sufiĉan por la ĉiutagaj bezonoj. En la ŝlosiloj troviĝas ankaŭ la plej necesaj informoj pri la Internacia Lingvo kaj pri organizo de la EO-Movado, inkluzive la landan organizaĵon, se tia ekzistas. Krome, kutime troviĝas informoj pri la ebloj plu studi la lingvon. (...) Kelkaj eldonoj de la ŝlosilo estis faritaj en tre multaj ekzempleroj. Ekzemple, la sveda *ŝlosilo* estis eldonita en 215 000 ekzempleroj ĝis la jaro 1953. Tiu libreto aperis en 39 lingvoj. Laŭ www.eo.wikipedia.org temas pri „miniatur-formata, malpeza kaj malkara informilo broŝura pri Esperanto, aldonebla al letero, kun konciza gramatiko kaj vortaro nacilingva-Esperanto.” Legante tion, ni konstatas, ke kune kun instruoj venas informoj pri la lingvo kaj la Movado, pri la landaj asocioj kaj la pliaj lernebloj. Tio devas inspiri nin nun. Ni ankaŭ povas kompreni, ke tia verketo estis supozeble en poŝtkarta formato DIN A6; do oni povis disdoni ĝin facile, aldoni al letero ekzemple. Ĉu io tia ekzistas nun? Ne ekzakte, laŭ



mia scio. Ni havas la **kalendarojn** eldonitajn de la franca TEJO-sekcio, kiuj prezentas etan kurson de Esperanto, kelkajn oftajn frazojn kaj indikojn pri telefono, retejo kaj poŝtadreso de la franca oficejo en Parizo (*vd foton*). Ĝi estas en la franca lingvo; ĝiaj mezuroj estas 11 x 8,5 cm. Faldebla. Ni havas en A6 formato la faman „*Poŝamikon*” de Katalin

Kováts kaj Béatrice Allée, kiu prezentas centprocente en Esperanto la tutan gramatikon per allogaj paĝoj koloraj kun multaj desegnaĵoj. En 44 paĝoj ni trovas vortojn, frazojn kaj klarigojn. Ne temas pri lecionoj; la gramatikaĵoj aperas laŭ temoj. La *Ŝlosiloj* estis supozeble inter tiuj du verketoj laŭ

amplekso. Ĉu nuntempe estas bezono krei ion tian? Iun paperan broŝureton por malkovro kaj memlernado? Aŭ ĉu la diversaj atingeblaj retejoj kontentigas tiun bezonon? Ĉu ili donas indikojn pri la movado, la lokaj kluboj, la ebloj plu lerni? Ĉu papera dokumento ankoraŭ nepras en nia nuna mondo? Ni pripensu.

Poste aperis „*Memlernilo de internacia lingvo Esperanto; Esperanto en dek lecionoj*” (Devjatnin, 1910, 160 paĝoj) Do jam pli ampleksa kurso. Sekvis diversaj eldonoj de kursoj kaj de vortaroj en naciaj lingvoj. Lernolibroj adaptiĝis al diversaj niveloj.

Supozeble en 1929 UEA kreis **Kontrolkomisionon de Lernolibroj**. Ĝia nomo bone priskribas ĝian taskon. Laŭ la Komitato de ILEI nun tio devus esti ankaŭ tasko de la nuna ILEI. Tamen la Ligo ne sukcesas plenumi tiun taskon pro manko je homfortoj. En la tridekaj jaroj aperis metodoj por instruado al infanoj en lernejoj. Lapenna mencias poste la aperon de internaciaj lernolibroj, tio estas lernolibroj nur en Esperanto. Ni citu kelkajn aŭtorojn: Cseh, Szilágyi, Szerdahelyi, Markarian, Friis, Miyake.

Kaj kio pri strukturoj: En 1924 kreiĝis **Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj TAGE**.

En 1949 kreiĝis la **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI**. Tiu solena paŝo okazis en Bournemouth, Britio, okaze de la Universala Kongreso. La unua prezidanto estis prezidantino: Sinjorino Violet Nixon el Britio. Sinjoro Einar Dahl el Svedio estis sekretario/kasisto. Okaze de la fondo estis plia konsilanto P. Korte el Nederlando. Konsilanto estis ankaŭ Sinjorino Jeanne Dedieu el Francio, kiu sekvas Nixon fariĝante la dua prezidanto, denove ina. Ŝajnas, ke tio estas tendenco ĉe ILEI... La Konferenco de ILEI kun numero 1 okazis kadre de la UK en 1967 en Roterdamo, Nederlando. La jaroj 1949 ĝis proksimume 1970 bezonus vastan esploron por aperi en kompleta lumo. Direndas, ke la Konferencoj de ILEI komence estis simpla evento kadre de UK.

En la du sekvantaj numeroj de IPR 2019 2 kaj 3 ni havos la okazon legi multon pri la periodo 1970 ĝis nun, ĉar ni petis de diversaj personoj kontribuajojn pri la tiama agado de la Ligo. Fakte estas, ke diversaj nunaj aktivuloj lernis kun tiamaj majstroj, profesoroj... do ni esperas kolekti impresojn pri tiu epoko. Tamen, se vi volas scii pli pri nia Ligo, pri ĝiaj prezidantoj, pri ĝiaj Konferencoj, pri lernolibroj, sciu, ke multo troviĝas en www.co.wikipedia.org. Multo troviĝas en la retejo de ILEI www.ilei.info kaj multo troviĝas en www.edukado.net.

La **arkivoj** de ILEI estas oficiale en Herzberg, Germanio; tie alvenas la nuntempaj eldonadoj, kongreslibroj k.s. Sed dokumentoj pri ILEI kuŝas ankaŭ en Massa, Italio, en arkivejo de la Ŝtata Arkivo, do ne moveblaj. Same en La Chaux-de-Fonds, Svislando, en la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia CDELI. Ni esperu, ke baldaŭ la katalogado en Massa kaj en La Chaux-de-Fonds povos atingi sian finon, tiel ke ni havu precizan liston de tio, kio kuŝas tie.

La nuna jubilea jaro ne devas esti nur rigardo malantaŭen, sed ankaŭ devas **sproni nin** al pli efika laboro. Tiu akronimo devas inspiri nin en nia jubilea jaro kaj poste:

TAGE, ĉiun tagon, ni klopodu altigi niajn lingvokapablojn.

TAGE ni legu en Esperanto por gardi la kontakton kun la stilo de aliaj, por sekvi la evoluon de la lingvo kaj de la Movado.

TAGE ni pripensu pri plialtigo de niaj instrukapabloj, pri diversigo de nia instrumaterialo.

TAGE ni esploru pri la instruado de aliaj, pri iliaj spertoj, pri la scienca evoluo en la fakoj psikologio kaj pedagogio/andragogio kaj pri la teknika evoluo, kiu povas subteni nian laboron.

UNESKO-Kuriero en EO kiel baza kursomaterialo: Spertoj en Azio kaj Eŭropo. Sugestoj por via asocio.

de Dennis KEEFE (Cullera, Hispanio)

Resumo:

La nova eldono de UNESKO-Kuriero en Esperanto (projekto subtenata de UEA kaj kreita kaj lanĉita de Trezoro Huang Yinbao de Ĉinio) iĝas eble la plej elstara atingo por la Esperanto-movado en la lasta jardeko. Nun indas plifortigi kaj plivastigi tiun sukceson. Unu el la plej bonaj manieroj fari tion estas montri la valoron de la Kuriero en Esperantaj kursoj en kiuj la UNESKO-Kuriero rolas kiel baza lernomaterialo. Tio havas avantaĝojn por lernantoj, por lokaj kluboj, por la Esperanto-Movado ĝenerale kaj por UNESKO mem. La unuaj du kursoj tiaj en Azio kaj en Eŭropo montras, ke tia aliro povas praktike realiĝi. La sekva artikolo priskribas tiujn novajn kursojn kaj sugestas, ke la baza modelo de la UNESKO-kursoj povas modifiĝi por utiligado en niaj lokaj asocioj, kaj eĉ, kun la helpo de esperantistoj, en la Kluboj de Amikoj de UNESKO.

Kiam ni esperantistoj pensas pri kursoj de Esperanto en niaj lokaj kluboj, en semajnfinaj staĝoj, aŭ eĉ en universitatoj, ni kutime pensas pri aranĝoj por lerni la lingvon, ne por uzi ĝin. Kursoj ĉu je la komenca, meza aŭ supera niveloj kutime konsistas el lecionoj pri gramatiko, morfologio kaj vortostoko, tio estas, pri la lingvo mem. Nur relative malofte okazas kursoj ne pri la lingvo, sed en la lingvo pri io alia; ne pri Esperanto, sed per Esperanto pri scienco, literaturo, diversaj fakoj praktikaj kaj teoriaj.

Unu nova ekzemplo de kurso, kiu utiligas Esperanton, sed kiu ne temas pri Esperanto, estas la *kurso UNESKO-Kuriero* (mallongigita al KUKO en ĉi tiu artikolo), kiu utiligas la novajn numerojn verkitajn en EO por lerni pri diversaj temoj, kiuj rilatas edukadon, sciencan kaj kulturon, la tri ĉefajn taskokampojn de UNESKO (Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). En la kurso pri UNESKO-Kuriero la gelernantoj ne parolas pri la sintakso kaj afiksosistemo de EO, sed pri tutmondiĝo kaj ĝiaj pozitivaj kaj negativaj flankoj; pri klimato-varmiĝo kaj la ŝanĝiĝo en nia ekosistemo; pri artefarita inteligenteco kaj mondo kun algoritmoj kaj robotoj; pri kultura kaj lingva diverseco.



La unua Kurso UNESKO-Kuriero – en Azio

La unua bakiĝo de KUKO okazis en la Seula Esperanto-Kulturcentro (LEE Jungkee) en decembro 2016. Pri tiu kurso ekaperis artikolo en la revuo *Esperanto* (feb. 2018). Por multaj koreaj gelernantoj, ne nur la materialo, la UNESKO-Kuriero, estis nova, sed ankaŭ la aranĝo de la instruado. La revuo de UNESKO ne estas facila lego-materialo por aziaj esperantistoj. Kelkfoje la kultura enhavo estas iom nekonata, sed la ĉefa uzo-malfacilaĵo kuŝas en la abundo da latindevenaj vortoj, kiuj ne similas radikojn en la ĉina, korea kaj japana lingvoj.

La kurso-aranĝo en KUKO estis nova ankaŭ por multaj koreoj, kiuj kutimas aŭskulti respektplene la instruiston. La kurso ne estis instruado-centra, sed lernocentra, do la gelernantoj plej aktivas. La instruisto rolis kiel kursgvidanto, helpanto, ne faranto, sed fariganto. Ne estis la instruisto, kiu

prezentis novan materialon, sed la gelernantoj mem. Ĉiu lernanto elektis en antaŭa leciono, unu el la artikoloj en la nova kolekto de UNESKO-Kuriero (en tiu momento jam eldoniĝis tri en Esperanto) kaj en la sekva leciono la lernanto prezentis tiun artikolon al siaj kunlernantoj.

La strukturo de la unua kurso kun UNESKO-Kuriero estis relative simpla. Unue, unu el la gelernantoj siamaniere prezentas unu artikolon el la Kuriero dum kvin minutoj. Due, la aliaj gelernantoj, kiuj atente aŭskultis tiun prezentadon, starigas demandojn al la prezentinto. Trie kaj finfine, la kursgvidanto faras komentojn, starigas demandojn kaj al la prezentinto kaj al aliaj gelernantoj, kaj eventuale rakontas anekdotojn ktp. La prezentado daŭris kvin minutojn; la gelernantaj demandoj kvin minutojn; kaj la kursgvidantaj komentoj inter unu kaj kvin minutojn.

Tiuj tri paŝoj (prezentado, demandado, komentado) konsistigas la bazan, ripetatan ciklon de la kurso. Ĉiu partoprenanto prezentas sian unuan artikolon, kaj post kiam ĉiuj jam faris tiun taskon, en alia tago, alia semajno, la gelernantoj prezentos siajn duajn artikolojn.

Kiel lingvo-instruisto mi estis tre kontenta pri la rezultoj de KUKO en Koreio. La metodo, en kiu la gelernantoj mem rolis kiel prezentantoj kaj instruantoj, bone sukcesis, kaj la materialo, kiu konsistis el kelkfoje malfacilaj artikoloj de UNESKO-Kuriero, sufiĉe bone taŭgis kiel serioza lernomaterialo.



La dua Kurso UNESKO-Kuriero – en Eŭropo (kompare kun Azio)

La dua bakiĝo de KUKO okazis dek monatojn poste en Francio, en la kastelo Greziljono, dum la kutima, ĉiujara aŭtuno-kursaro (de la 26a de oktobro ĝis la 3a de novembro). Kiel en Azio, tiu kurso laŭ metodo kaj precipe laŭ enhavo estis nova maniero kurso en Eŭropo. Kiam mi proponis tian kurson al la Kastelo, nek ili nek mi certis tiutempe, ke homoj emos aliĝi al tiu novstila kurso. Tamen iom neatendite enskribiĝis 11 homoj, kaj kelkfoje ĉeestis ĝis 13, duoble pli da homoj ol kiam, du jarojn antaŭe, mi gvidis kurson tie pri la fama revuo *Juna Amiko*.

La Eŭropa kurso similis tiun de Azio en pluraj aspektoj, sed ankaŭ estis diferencoj.

Kursopartoj. En Koreio, kiel menciite supre, la leciono konsistis el tri ĉefaj partoj, kiuj ripetiĝis je unu lernanto post la alia: prezentado de artikolo (unu lernanto), pridemandado pri la artikolo (ĉiuj aliaj gelernantoj), komentado (la kursgvidanto). En Francio, kvara parto aldoniĝis pri novaj vortoj, terminoj kaj frazoj uzataj en la artikolo.

Tempodaŭro. En Koreio, ĉiuj tri partoj, teorie, daŭris kvin minutojn, do entute ĉirkaŭ 15 minutoj (3 x 5) dediĉatis al ĉiu UNESKO-Kuriera artikolo. En Francio, ĉiu parto, laŭplane, daŭris 10 minutojn, do duoble pli, kaj la tuto daŭris 40 minutojn (4 x 10). La tempodaŭroj, tamen, ofte variis multe pli. Prezentantoj uzis pli aŭ malpli da tempo por siaj prezentaĵoj. Demandantoj starigis multe pli da demandoj ol antaŭplanite al la prezentintoj. La kursgvidanto, pro tempomanko, uzis nur unu aŭ du minutojn el la planitaj dek, aŭ inverse, utiligis pli da tempo kiam tempo abundis.

Preparo-tempo. La Koreoj havis multe pli da tempo, unu semajnon, por antaŭprepari siajn artikolo-prezentadojn. La Francoj, aliflanke, havis nur unu tagon, kaj bedaŭrinde la tagordo dum la aktivaĵo-plena Aŭtuno-kursaro de Greziljono estis tro plena por havigi sufiĉe da libera tempo kiun oni bezonus por bone plani prezentadojn. Tempo por prepari, eksterkurseje, ege gravas en ĉi tia kurso, kie la gelernantoj, ne la instruisto, respondecas pri la instruado. La artikoloj en UNESKO-Kuriero ofte troviĝas je tre alta intelekta nivelo, kaj bezonatas multe da tempo por nefakuloj legi, kompreni, prepari prezentadon kaj praktiki.

Kurso-materialo. La unua KUKO en Koreio, kiu okazis en Decembro, 2017, havis nur tri disponeblajn numerojn de UNEKSO-Kuriero en Esperanto. La dua KUKO en Francio okazis 11 monatojn poste, en novembro 2018, kaj tial havis ses numerojn ĉemane. Krome en la lastaj lecionoj en Francio, la kursgvidanto montris la tutan arkivon de la Kuriero, kaj en siaj lastaj prezentadoj, gelernantoj povis elekti inter originalaj artikoloj en la franca, hispana, rusa, araba, ĉina kaj portugala lingvoj. En Koreio la gelernantoj havis nur la unuan numeron de la UNESKO-Kuriero en la papera versio. Ili uzis la elektronikan, elŝuteblan version por la aliaj du. En Francio, la Franca Esperanto-Centro de Parizo liveris kvin el la ses disponeblaj numeroj al la Kastelo (Dankon al François Lo Giacomo kaj Bert Schumann!), kio multe helpis por la elekto de artikoloj kaj ankaŭ por la prezentadoj, ĉar la lernantoj povis montri la artikolon kune kun ĝiaj trafaj fotoj kaj desegnaĵoj.

Prezentado-metodoj

En ambaŭ kazoj lernantoj povis prezenti sian artikolon per iu ajn organizo-principo kaj per iu ajn prezentado-metodo. En Koreio kaj, laŭ mia sperto, en Azio ĝenerale, estas tendenco prezenti materialon legante antaŭpreparitan tekston. En Francio, aliflanke, neniu en la kurso de Greziljono faris legatan prezentadon. Kutime, tamen, en ambaŭ landoj kursanoj spontane, kun iom da antaŭpreparo, faris siajn prezentadojn. Kelkfoje, ne ofte, oni utiligis projekciilon aŭ lumbildojn.



Kurso-partoprenantoj: Indas menci, ke kelkaj gelernantoj en Seulo estis altnivele preparitaj intelekte, kaj tri el la dek gelernantoj diplomigis ĉe la prestiĝa Seula Nacia Universitato. Krome menciindas, ke la gelernantoj sciis ANTAŬE, ke la kurso-temo estos pri la UNESKO-Kuriero.

En Francio, la plejparto de la gelernantoj estis instruistoj en elementaj aŭ mezlernejoj,

kaj la plejparto NE sciis, ke la kurso estos ekskluzive pri la UNESKO-Kuriero. En ambaŭ kursoj la aĝo de la partoprenantoj estis inter 25 kaj 80 jaroj proksimume, kun iom pli juna mezaĝo en Koreio ol en Francio.

Resume pri Koreio kaj Francio. La kurso sufiĉe bone sukcesis kaj en Azio kaj en Eŭropo. La materialo, kiu konsistas el la Esperantaj numeroj de UNESKO-Kuriero, kvankam ofte malfacila, pro enhava kaj lingva kialoj, povis esti utiligata, se estis sufiĉe da tempo por legi kaj antaŭprepari la artikolojn. La modelo, en kiu la instruisto ne rekte instruas, sed nealtrude kursgvidas lasante la instruadon al la gelernantoj, bone funkcias. En ambaŭ landoj, kelkaj gelernantoj planis starigi proprajn, lernanto-gvidatajn lecionojn uzante UNESKO-Kurieron en siaj lokaj kluboj. Kvankam tia kurso ne kongruas kun la lingvaj bezonoj de multaj esperantistoj, ĝi jes ja povas roli kiel niĉo-kurso, en kiu minoritato de Esperantaj kaj Uneskaj aktivuloj povas partopreni.

Kelkaj valoroj kaj avantaĝoj de KUKO por Esperantujo kaj UNESKO

Mi pensas, ke la kurso pri la Esperanta UNESKO-Kuriero indas plidisvastiĝi pro pluraj kialoj. Unue, ĝi havas edukan valoron por la gelernantoj. Ili lernas paroli pri aktualaj temoj, kiuj gravas en nia nuna mondo, ekzemple, pri klimato-ŝanĝoj, daŭripova evoluo, egalrajta edukado, artefarita inteligenteco kaj pri ĉio, kio rilatas sciencajn, edukajn kaj kulturajn temojn.

Due, la UNESKO-Kurso havas valoron por niaj lokaj kluboj de Esperanto. Se estas sufiĉe da lokaj parolantoj kiuj interesiĝas pri tiaj intelektaj temoj, la Kuriero provizas per sufiĉe da interesaj artikoloj, pri kiuj interdiskuti, kaj KUKO estas taŭga metodo por antaŭenigi tian diskutadon.

Avantaĝoj ekzistas ankaŭ por ILEI kaj UEA. KUKO plene kongruas kun la UNESKAJ kaj UN-aj strategiaj celoj de niaj internaciaj, Esperantaj asocioj. Kaj speciale KUKO estas konkreta apliko de tiaj celoj. Kursoj, kiuj utiligas la Kurieron, estas klaraj indikoj al eksteruloj, ke la temo UNESKO estas multe pli valora ol nur gratulaj vortoj. KUKO konvinke montras seriozan kunlaboron kun la Kuriero kaj UNESKO. Kiel en la popola diraĵo: Agoj parolas pli laŭte kaj konvinke ol vortoj.

Kaj finfine, KUKO estas modelo imitinda de aliaj lingvo-parolantoj de UNESKO-Kuriero. Esperanto tiusence avangardas. Ni en Esperantujo povas montri la vojon, laŭ kiu ĉia leganto de la Kuriero, en ĉiuj mondopartoj, povas utiligi la enhavon de tiu grava revuo en seriozaj diskutoj pri seriozaj edukaj, sciencaj kaj kulturaj fenomenoj. Kaj la efiko de la Esperanto-partopreno povas esti eĉ pli evidenta pro tio, ke kvankam la esperantista diasporo estas relative nemultnombra, tamen ĝi troviĝas en pli da kontinentoj kaj landoj ol tiuj de legantoj de aliaj lingvo-versioj de la Kuriero. Esperantistoj, se ili vidigas siajn KUKOjn, eventuale en kluboj de Amikoj de UNESKO ĉiuloke, povas montri al francaj, rusaj, ĉinaj, portugaliaj, hispanaj, arabaj kaj eĉ anglaj legantoj de la Kuriero, ke eblas sekvi la Esperantan modelon ankaŭ en tiuj aliaj lingvoj. Esperantistoj povas ludi gravan rolon en plenkreskula edukado rilate UNESKOn.

Aplikado kaj modifado de KUKO por via loka klubo

Por fini ĉi tiun artikolon indas pensi pri la maniero, kiel la lokaj kluboj de Esperanto povas starigi siajn proprajn kursojn, utiligantajn UNESKO-Kurieron kiel lernomaterialon. La modeloj de Azio kaj de Eŭropo, supre prezentitaj, tutcerte povas esti modifitaj por specialaj lokaj cirkonstancoj, kaj eble estus bone pensi pri kelkaj kurso-detaloj, kiuj povas helpi sukcesigi tiajn kursojn.

Unue, KUKO ne estas por ĉiaj esperantistoj. Ĉeestu nur tiaj lernantoj, kiuj bone interesiĝas pri la afero. La temoj de UNESKO estas, ni diru, altnivelaj, seriozaj. Ĝi ne estas kurso pri *Gerda malaperis*, kaj la enhavo estas multoble pli komplika ol tiuj de, ekzemple, la *Cseh-Kurso* aŭ *Duolingo*. La lernanto bezonas bonan nivelon de Esperanto, kaj se ne, tre altgradan motivon por multe labori, legi, kompreni, kaj prepari prezentadon pri UNESKO-artikoloj.

Due, indas pensi pri la kurso-ritmo. Ĉiutaga kurso estas malfacila kaj taŭgas nur por lernocentroj kiel Greziljono kaj similaj, kie gelernantoj povas dediĉi sin plene al la legado kaj prezentado de la enhavo de la Kuriero. Ĉiusemajna kurso en loka klubo ankaŭ povas esti tro ofta. La kurso povas, aliflanke, okazi ĉiumonate, donante sufiĉe multe da tempo por tre bone legi la artikolojn kaj antaŭprepari ilin. Kaj pro tio, ke la revuo aperas ĉiutrimonate, eblas pensi pri kvar specialaj lecionoj en la jaro. Unu kurso-sesio por ĉiu nova numero. En tia situacio, oni povas pensi ankaŭ pri grupo-prezentado, teamo-laboro, kiam la artikoloj prezentiĝos duope, triope, kvarope.

Trie, pri la kurso-materialo, jam menciigis la utiligo de ne nur la Esperantaj versioj, sed ankaŭ de la nacilingvaj numeroj de la arkivo de la Kuriero, kiu datiĝas de 1948. Kompreneble, la prezentadoj, la pridemandado kaj ĉio en la kurso okazos Esperante. Krom la arkivo penseblas aldoni alian materialon, kiu rilatas la kurierajn temojn, ekzemple rilatajn artikolojn de Vikipedio aŭ de alia fonto.

Kvare, indas memori, ke en la trifaza ciklo – prezentado, pridemandado kaj komentario – ĉiuj gelernantoj partoprenas. Tio precipe substrekindas en la ero, en kiu la gelernantoj starigas demandojn aŭ eventuale faras komenton al la lernanto, kiu ĵus prezentis sian artikolon. La kursgvigado devas zorgi pri tio, ke ĉiuj partoprenu dum la leciono. Kelkaj parolos pli, kelkaj malpli, sed ĉiuj devas fari sian kontribuon al la interparolado, eĉ se ilia komento aŭ demando estas mallonga aŭ tre simpla.


Venonta KUKO en Eŭropo: kaj por gelernantoj kaj por geïnstruistoj

Kurso pri UNESKO-Kuriero kaj kiel utiligi ĝin en lokaj kluboj de Esperanto okazos en la kastelo Greziljono, inter la 8a kaj la 18a de julio 2019. Tiu kurso estos por tiuj, kiuj volas partopreni kiel gelernantoj, kaj por tiuj, kiuj volas poste instrui, kursgvidi tiajn kursojn en siaj lokaj kluboj kaj asocioj de Esperanto, kaj eventuale en Kluboj de Amikoj de UNESKO (en Esperanto, aŭ en naciaj lingvoj). Detaloj pri tiu nova kurso UNESKO-Kuriero troviĝas ĉe www.gresillon.org/s2

El la statuto de ILEI, ĉapitro CELOJ. La unua frazo estas

3.1 Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.

Surbaze de tiu firma celo ni publikigas artikolon de Christian Degiorgi el prezento okaze de Ĝeneva Forumo en dec. 2018 ĉe UN en Ĝenevo.



UNION DES NATIONS POUR L'ENSEIGNEMENT, LA SCIENCE UNIVERSELLE ET LES DROITS DE L'HOMME

Unio de Nacioj por Instruado, Universala Scienco kaj Homaj Rajtoj

Ĝeneva Forumo decembre 2018

Parolado de Sinjoro Christian Degiorgi

Tradukis el la franca Mireille Grosjean

Mikrokosmo & Makrokosmo: naturo kaj homeco



Naturo, homo, homo kaj naturo...

Ĉu tiu paro havas estontecon?

Stranga demando ĉu ne?

Ene de iom pli ol jarcento homoj faris el la planedo preskaŭ mortan teron. Ni multe prenas el ĝi, sed kion ni lernas de ĝi? Ĉu ĝi povus esti nia plej bona pedagogo? Tutcerte jes, se ni havus iom da humileco kaj kapablas rezigni pri nia kutima mondkoncepto.

Kion ĝi povus komuniki al tiuj homaj estaĵoj, kiuj nur mallonge restadas sur la Tero? Ĉu ĝi portus signojn de *socia paradigmo de la 21-a jarcento*?

Ni povas koncepti la naturon sen la homo, sed ne la malon. En la naturo ĉio estas ŝparado; ĉe homo ankaŭ. La naturo parolas al ni pri Harmonio, Ordo, Ekvilibro, Mezo. Ĝi havas siajn leĝojn. Ni kreis aliajn leĝojn, kiel eble pli severajn, ĉar ni taksis nin pli kleraj. Kia orgojlo!

En la naturo ĉio estas NOMBRO, PEZO kaj MEZURO, sed ankaŭ okazas, ke ĉio estas juĝata, kondamnata kaj detruata, kio ne partoprenas en tiu harmonia ekvacio.

Ni parolas pri SCIENCO, EKONOMIO, JUSTECO, ĉar tio kontribuas al la socia vivo de homoj. Ni estas funde mineralaj, vegetalaj kaj animalaj, kun eta pluso: iu MI egoisma kaj ĵaluza.

La naturo estas nia plej granda Kapitalo. Ni urboloĝantoj tendencas forgesi tion. Ni ne devas nun pensi pri agado por savi la restaĵojn, sed pli trafe ni devas imagi, kiel ni kondutos, kiam katastrofaj eventoj vastskalaj okazos. En tiu momento nia scienco neniel helpas al ni. Jen la urĝeco. Nur nia bona volo povus liberigi nin el nia blindeco. Bedaŭrinde tro malmulte da homoj kuraĝas iri alian vojon ol...

Tio, kion mi volas komuniki al vi hodiaŭ, resumiĝas al kompreno de la viva procezo kaj de ĝia pedagogia valoro kaj ekzemplodona karakterizaĵo.

La naturo, kiun ni tuŝas per niaj kvin sensoj, estas ekvacio LUMO, VARMO kaj VIVO.

La homa naturo estas triaspekta: mi pensas, mi sentas, mi agas.

En la organika kampo mi estas sistemo neŭrosensiva, ritma kaj metabola.

La socia homa vivo ekde la originoj evoluas laŭ ekvacio NATURO, LABORO kaj KAPITALO.

La vivo de la homoj konstruiĝis sur tiu organika triopo. Ĉirkaŭ ni estas diversaj sociaj modeloj. Ni havas ilin en nia korpo. Naturo alparolas nin. Ni ne atentis ĝiajn alvokojn, restante surdaj. Oni ŝtelis de ni niajn rajtojn, oni trudis al ni devojn, kiuj ne devus esti. Oni forviŝis el nia menso niajn verajn devojn pri la Tero. Same kiel la elementoj, la ĉeloj, kiuj konsistigas nin, ni devas repreni niajn naturajn rajtojn. Ni devas rekonstrui la naturan ordon de la aferoj, ne plu en etaj preĝejoj sed en demokrata katedralo.

La Nacioj, mondaj organoj, devas ricevi nutradon per la sama sango. Ili devas kunlabori por unu sola tasko: tiu de la bona funkciado de la viva potencialo, kiun ni devas respekti kaj gvidi al Bono. Sano estas ĝia rezulto. Ankaŭ la monda sano.

Unue ni devas kompreni nian trioblan homecon. Nia eduka sistemo devas kontribui al evoluo de niaj konscioj. Niaj ideoj devas submeti sin al sentemo kaj kompreno nutritaj de la naturo. Nur la naturo kapablas instrui al ni la

vivon vere. Ni devas fari tujan salton en tiun direkton, se ni volas eviti homan dronadon.

Sen iri for en filozofion, sufiĉas observi la konduton de abeloj en la naturo. Oni tiam komprenas, ke la mondo estas multe pli ol envicigo de materioj kaj molekuloj, sed ke ĝi konsistas el vibradoj kaj informoj. La abeloj ne nombras la milojn da floroj, kiujn ili bezonas. Ili simple fekundas la florojn kun tre suna intenco kaj komuna komunikmaniero tre evoluigita. Verŝajne ili estas la nuraj vivaj estaĵoj, kiuj anstataŭ detruiri fekundas. Ili prenas el la naturo tion, kion ili bezonas, laboras ĉiutage por nutri siajn estontajn generaciojn kaj ofertas al sia ĉirkaŭaĵo valoran donacon per polenado. Ni povus trovi ĉe ili inspiron.

La granda laboro de la 21-a jarcento estas la renaskiĝo de la kono per forpreno de la ombroj, kiuj kovras ĝin. La renaskiĝo de nia socia korpo inkluzivas la renaskiĝon de la triobla homa naturo, forigante nian egoismon. Se ni planas ekonomion en rilato kun la tuta Tero, niaj agoj transformos la planedon. Tiel povos naskiĝi fratecaj grupoj, por ke la renkontiĝo kun aliuloj fariĝu faktoro de socia resaniĝo je planeda nivelo.

Mi invitas vin forlasi la bruon, kiun ni kaŭzas, malfermi viajn orelojn por finfine denove aŭdi nian superan naturon, la fortojn de la spirito, kiuj faras la geniecon kaj grandecon de la naturo kaj de la homaro.

ILEI agadas ĉe UNESKO. KONFERENCO DE NRO-oj –UNESKO 17/18/19 decembro 2018

Martine kaj Max Demouy malkovris la taskon reprezenti nian asocion kaj tre lerte kaj efike reagis. La salutmesaĝo de la Ĝenerala Direktorino de UNESKO -Audrey Azoulay- okaze de UEA Kongreso en Lisbono en 2018 multe rilatis al la graveco de instruado de Esperanto, do ni elektis kiel dokumenton kelkajn eltiraĵojn. Estis pli ol 100 NRO-oj reprezentitaj, salono estis preskaŭ plenplena, tamen restis lokoj por Observantoj kiel ni.

Sinjoro Sene el Senegalo, respondeculo pri Federacio de sindikatoj de Instruistoj, tiom interesiĝis pri Esperanto, ke li tuj sendis mesaĝon al Mirejo Grosjean kaj pretas helpi por organizi eventon en Senegalo!

Marde posttagmeze, UEA petis kaj ricevis budon bone lokitan kaj bonŝance, samtage okazis la Internacia Tago de la Araba Lingvo. Fakto estas, ke ILEI kunlabore kun ĝiaj observantoj ĉe UNESKO kreis informilon dupaĝan kaj produktis ĝin en la ses UNESKO-lingvoj. Ekzempleroj en la araba estis en tiu tago tre utilaj. Por la unua fojo preterpasis multaj junaj arabinoj, ili interesiĝis pri la lingvo kaj ni povis enmanigi dokumentojn en la araba kaj diskuti ĉu angle ĉu france. Ĝojindas kontakti homojn ne facile atingeblajn ĝis nun.



De maldekstre: Monique ARNAUD, Max DEMOUY, Rakoen MAERTENS, Renée TRIOLLE, Patrick GALLAUD (vicprez. de la ligkomitato de NRO-oj), François LO JACOMO, Martine DEMOUY. (Fotis: Martine DEMOUY)

Bone ke du Asocioj partoprenas, tiel homoj havas plian ŝancon paroli kun ni. Tio okazis por sinjorino Doina Spita el Rumanio rilate al interkompreniĝo de lingvoj kaj same ni povis kontakti sinjoron Diego, el *Tradicioj por Morgaŭ* kiu lanĉis: 2019 Internacia jaro por indiĝenaj lingvoj.

Raportis Monique ARNAUD, Observanto de ILEI ĉe UNESKO

Jen eltiraĵoj disdonitaj al la partoprenintoj

„Kiel vi scias, UNESKO subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj. Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: espero en konstruado de paca mondo, harmonia kunvivado inter la popoloj, respekto al kultura diverseco, solidareco trans la limoj. La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, dividi inter si. Lingvoj estas la vektoro, kiu ebligas tiun dialogon; ili konsistigas do

esencan ilon por atingi la celojn, kiujn ni devas konkretigi kaj por la defendo de niaj valoroj.

... Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de la plimulto. Ĝi ebligas ekziston de homgrupo de parolantoj sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas alten iri kaj atingi kosmopolitikan konscivivon, esti mondcivitano – sen forlasi siajn apartajn ligojn. Via elektita temo por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: „Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?”

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via Movado kaj nia Organizo montras de jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn. Defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi la plurlingvan edukadon. Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluziveman kaj pacan.”

Novtipa enkonduka lernobjekto por rapidigi fremdlingvan lernadon – Multlingva Akcelilo

de Zlatko TIŠLJAR (Slovenio)

Projekto *Multlingva Akcelilo*, kiun ideo kreis homoj en Inter-kulturo en Maribor baze de la koncepto de instruado laŭ la Zagreba Metodo, estis akceptita de Erasmus + kaj aprobita por eŭropa financado. En la projekto asociiĝis 9 partneroj el 6 landoj: du universitatoj (Suddana kaj Maribora - Slovenio), tri elementaj lernejoj (el Vraca – Bulgario, Zagreb – Kroatio kaj Ŝentilj – Slovenio), E@I el Slovakio, Inter-kulturo el Maribor, Studio Gaus el Berlino kaj la portanto de la projekto (Izvori – eldonejo en Zagrebo).

Ĉiuj el ili havas precize difinitajn taskojn. La didaktikajn materialojn kreas Inter-kulturo, du elementlernejoj kaj E@I kun helpo de Miguel Fernandez Aduriz, Maribora Universitato science kontrolas la tutan projekton en ĉiuj fazoj, la Suddana Universitato kreas specifajn lud-ekzercojn, kiujn produktos komputilo, la tri lernejoj efektigos tri kursojn eksperimentajn per la kreitaj didaktikaĵoj, Studio Gaus kreas interretan portalon kun helpo de ĉiuj partneroj kaj Izvori zorgos pri la administrado de la projekto.

La projekto daŭras 26 monatojn (de novembro 2017 ĝis fino de 2019).

La celo de la projekto estas krei didaktikajn materialojn bazitajn je minimuma lingva materialo laŭ la komputilaj kalkuloj de Zlatko Tišljar pri la plej oftaj morfemoj en parolata Esperanto kaj postaj kalkuloj pri la plej oftaj morfemoj en 2-milion-vorta skriba korpuso, por kio softvaron kreis Gerard Raymond. Oni decidis krei didaktikaĵojn por ĉirkaŭ 230-plej oftaj morfemoj similaj en ambaŭ esploroj, kiuj kovras ĉirkaŭ 80% de la lingva korpuso. La didaktikaj materialoj devas ebligi realigon de 64-hora instruobjekto *Multlingva Akcelilo*, kiu estas instruata al infanoj en 3-aj klasoj de bazaj lernejoj dum unu lernojaro (2 horojn semajne). Tiu lernobjekto devas esti tiel konstruita, ke ĝi rapidigos postan lernadon de dua aŭ tria fremdlingvo tiel ke, post du jaroj, la infanoj jam estos pli sukcesaj pri tiuj fremdlingvoj ol infanoj, kiuj ne havis la enkondukan lernobjekton.

La tria celo estas krei la lernobjekton tiel ke povu instrui ĝin kiu ajn fremdlingva instruisto helpe de la kreitaj didaktikaĵoj, instrukcioj kaj lernportalo. Ĉar la bazo de la objekto estas minimuma Esperanto el 230 morfemoj, la instruadon povos realigi instruistoj sen antaŭa kono de Esperanto.

Post la fino de la unua projektduono en decembro 2018 estis jenaj rezultoj:

1. Ĉiuj partoprenintoj en la eksperimentaj 3 kursoj, en kiuj la instruistinoj neesperantistaj instruis dum 20 horoj po 2 lecionojn el la Zagreba metodo dividitaj je 10 lernoblokoj, estis tre kontentaj pri la rezultoj kaj entuziasme volas daŭrigi la kurson de novembro ĝis aprilo 2019, kvankam tio ne estis deviga laŭ la projekto. Do, entuziasmas laŭ la enketoj de la Maribora Universitato ĉiuj: 41 gelernantoj, iliaj gepatroj kaj 5 instruistinoj de la koncernaj lernejoj.

2. La didaktikaĵoj, kiujn kreis Zlatko Tišljar kun etaj korektoj interkonsentitaj inter la partneroj dum la unua renkontiĝo de la partneroj en Zagrebo en januaro 2018, montriĝis tre trafaj. Dum la dua renkontiĝo en septembro en Bratislavo la partneroj iom kompletigis la principojn kiel plu evoluigi la didaktikaĵojn. Tiuj principoj konfirmis kaj fortigis la rolon de specialaj kantoj por infanoj laŭ konataj melodioj, fortigis la gravecon de ekzercoj, per kiuj la infanoj kreas frazojn – ĉar tiuj ne nur estis tre bonaj por ekzercigi kaj komprenigi vortkreadon kaj aparte la frazkonstruadon, sed ankaŭ por vortlernado. Nome solvante la taskojn de tiuj ekzercoj, la infanoj devas distingi frazojn kun senco disde tiuj sen senco, kvankam ĉiuj estas gramatike korektaj. Por tio ili devas scii la vortojn kaj, se ili ne scias ilin, ili serĉas ilin en vortaro. Ripetante tion plurfoje, ili lernas vortojn sen klasika klopodado parkeri ilin.

3. Oni decidis forigi el la komenca koncepto la ekzercojn kun demandoj, kiuj tro pezigas la kurson kaj la plej multajn ekzercojn en la portalo www.learn.esperanto.com. Oni fortigis la funkcion de dialogoj kaj ŝkeĉoj kaj de la kantoj.

Montriĝis ke la ideo pri kelkaj tute novaj aspektoj de instruado estis tre sukcesaj:

1. Oni instruas materialon de 230 plej oftaj morfemoj (baze de sciencaj esploroj) kaj uzante modernan informadikan teknologion – jam ekzistantan interretan kurson laŭ la Zagreba metodo www.learn.esperanto.com (kvin unuaj lecionoj) kaj kreante novan portalon ĝis la projektofino. Infanoj tre ŝatas la uzon de komputilo dum la lernado.

2. La instruadon ne efektivas konantoj de Esperanto, sed regulaj geinstruistoj de fremdlingvoj en la lernejoj, danke al kio estas solvita formala problemo krei diplomitajn instruistojn de Esperanto.

Ĉiuj tiuj novaĵoj kaj modernigoj montriĝis jam en unua fazo de la instruado tre sukcesaj. Post la fino de la projekto, la aŭtoroj intencas prezenti novan projektproponon al Erasmus+, per kiu oni daŭrigos la laboron tiel ke estos organizita eksperimenta instruado laŭ la didaktikaĵoj kreitaj en *Multlingva Akcelilo* en deko da eŭropaj lernejoj cele al pruvo pri tio, ke tiu ĉi enkonduka lernobjekto vere plirapidigas la lernadon de la dua aŭ tria lingvoj. La nova projekto daŭrus 3 jarojn kaj agus laŭ la sciencaj principoj kreitaj en Paderborna Kibernetika Instituto de d-ro Helmar Frank, kun paralelaj kontroloj de fremdlingvaj konoj ĉe la infanoj, kiuj lernas unue pere la *Multlingva Akcelilo* kaj infanoj, kiuj ne havis tiun antaŭobjekton. Dum tri jaroj la rezultoj devus montri, ke la *Multlingva Akcelilo* rapidigas la lernadon de fremdlingvo je 25-30%, kiel montriĝis en antaŭaj partaj eksperimentoj.

Freŝaj informoj pri la KER-ekzamenoj

de Katalin KOVÁTS (Nederlando / Hungario)

UEA, kunlabore kun la hungara ekzamencentro ORIGO (pli frue ITK) jam ekde 2008 okazigas ekzamensesiojn laŭ la Eŭropa Referenckadro. 2018 estis laŭkalendare la dekunua ekzamenjaro, en kies fino ni atingis sume 2 242 sukcesintojn el 74 landoj. En 2018 okazis entute 10 memstaraj ekzamensesioj. Al la ekzamenoj dum la jaro aliĝis entute 268 personoj, el kiuj sukcesis 230 kandidatoj (86%).

SUKCESINTOJ en 2018

	B1			B2			C1			Poentoj*	Personoj
	S	P	K	S	P	K	S	P	K		
1. Brazilo	8	0	1	6	0	0	2	3	8	85	28
2. Sud-Koreujo	16	0	0	4	1	0	6	0	1	50	28
3. Francujo	5	0	1	6	0	2	7	3	1	63	25
4. Usono	1	0	3	2	0	5	1	0	7	76	19
5. Ĉinujo	13	0	0	2	0	0	2	0	0	23	17
6. Meksiko	5	0	0	6	0	1	1	0	0	24	13
7. Kolombio	7	0	0	2	0	0	2	1	0	20	12
8. Pollando	0	0	1	1	0	5	0	0	5	54	12
9. Hispanujo	1	0	2	1	0	1	1	0	5	44	11
10. Rusujo	3	1	1	4	0	0	2	0	0	20	11
11. Japanujo	3	0	0	3	0	0	3	0	0	18	9
12. Britujo	0	0	3	0	0	2	0	0	4	38	9
13. Svislando	2	1	1	0	1	1	0	0	0	11	6
14. Italujo	0	0	0	0	0	0	0	0	4	24	4
15. Belgujo	0	0	1	0	0	1	0	0	2	18	4
16. Nederlando	0	0	0	0	0	1	0	1	1	13	3
17. Kanado	0	0	0	0	0	0	3	0	0	9	3
18. Norvegujo	1	0	0	0	0	0	0	0	1	7	2
19. Ĉeĥujo	0	0	0	0	0	2	0	0	0	8	2
20. Danujo	0	1	0	0	0	0	0	0	1	7	2
21. Slovakujo	0	0	0	0	0	0	0	0	2	12	2
22. Hungarujo	0	0	0	0	0	0	0	0	2	12	2
23. Togo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
24. Irano	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
25. Germanujo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
26. Libano	0	0	1	0	0	0	0	0	0	2	1
27. Puerto-Riko	0	0	0	0	0	1	0	0	0	4	1
28. Portugalujo	0	0	0	0	0	0	0	0	1	6	1
Entute	65	3	15	37	2	22	30	8	48		
		83			61			86			230

* C1K valoras 6 poentojn, B2K-ekzameno 4, B1K 2 poentojn.

La skriba aŭ parola aparte valoras la duonon de la koncerna nivelo.

Por la jaro 2019 jam estas lanĉitaj kelkaj ekzamensesioj.

La 8a tutmonda ekzameno okazos la 15an de junio. Krom por tiu aranĝo estas jam menditaj sesioj por Greziljono, Raleigh kaj Moskvo.

Komprenible, kiel en ĉiu jaro, okazos ekzamenoj ankaŭ dum UK en Lahtio.

Interesiĝantoj por okazigi sesion skribu al: ker-ekzamenoj@edukado.net.

Pliaj informoj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Ekparoligu viajn kursanojn per Ekparolu!

de Katalin KOVÁTS (Nederlando / Hungario)

Ekparolu! estas programo, funkciigata ekde 2016 fare de edukado.net. La baza ideo estas, ke spertaj esperantistoj (geonkloj) helpe de skajpo volontule okazigas parolsesiojn kun komencintoj (genevoj). La kunlaborantaj 63 geonkloj devenas el 27 landoj. Dum la du unuaj jaroj al la programo aliĝis 130 genevoj el 35 landoj. Ĝenerale la genevoj ricevas po 10 parolsesiojn, sed pluraj el la 56 finintoj havis 20, kelkfoje eĉ 30 sesiojn. En la unuaj du jaroj ni okazigis pli ol 1 200 lecionojn, sed ni havas multajn liberajn laborfortojn. La partoprenintoj de *Ekparolu!* estas kontentaj pri la servo, sed la programo ne estas ankoraŭ sufiĉe konata.

Instruistoj, kursgvidantoj, bonvolu disvastigi la informojn pri *Ekparolu!*. Direktu al ĝi viajn gelnantojn, stimulu ilin je interparoloj kun alilingvaj geonkloj, eventuale donu al ili taskojn, konkretajn temojn, pri kiuj ili akiru informojn. *Ekparolu!* povus esti bonega kompletigo de viaj kursaj laboroj.

Pliaj informoj, aliĝebloj (kaj por esti onklo aŭ onklino kaj por peti parolsesiojn) troviĝas ĉe: <https://edukado.net/ekparolu>.

Niaj plej diligentaj onkloj en la du unuaj jaroj estis:

Jean-Jacques Wintraecken el Nederlando kun 116 sesioj

Anjo Amika el Hungario kun 103 sesioj

Vida Kulikauskiene el Litovio kun 86 sesioj

Peter Weide el Danio kun 68 sesioj

Jannick Huet el Francio kun 66 sesioj

Miroslav Vaĉo el Ĉeĥio kun 60 sesioj

Johan Derks el Serbio kun 59 sesioj

Raffaella el Italio kun 58 sesioj

Hoss Furooznia el Usono kun 48 sesioj

Mariusz Hebdzyński el Pollando kun 45 sesioj

Katalin Kovats el Nederlando kun 40 sesioj

Letero de kursfininta nevino



Saluton Katalin,

mi skribas, ĉar en la sepa de Aprilo okazos mia lasta sesio. Mi vere estas tre dankema pro la eblo partopreni en la *Ekparolu!*-projekto. Kiam mi eksciis pri la projekto de onklo sinjoro Piet Glorieux somere dum la BET 2017 en Latvio, mi tiam tute ne povis imagi, kiom multe da ĝojoj kaj spertoj mi trovos kaj kiom multe ĝi helpos al mi pliboniĝi en Esperanto. La projekto estis mia praktike nura ŝanco ekzerci paroladon. Dank' al *Ekparolu!* mi havas eĉ kuraĝon partopreni en la

Somera Esperanto-Studado en Slovakio somere ☺.

Longe mi kolektis mian kuraĝon, antaŭ ol mi aŭdacis aliĝi kaj solvi la enir-testojn. Verdire, ili ne estis facilaj por tia flavbekulino kiel mi. La plej malfacila afero estis vidi la malgrandan horloĝon super la testo, kalkulante sekundojn ĝis la fino de ĝi - vere nervostreĉa detalo! Sed bonŝance mi ne bezonis la duan provon, kaj sukcesis en testoj. Mi tre ĝojis!

Mi volas danki ĉiujn geonklojn. Komprenoble mi ne povis paroli kun ĉiuj , sed mi ne dubas, ke ili ĉiuj estas bonegaj. Estas ja ilia libera tempo, ilia bonvolo kaj ilia energio, kiun ili kontribuas en la projekto kaj mi vere tre alte taksas ilian grandan laboron.

Mi estis feliĉulino kaj entute havis 20 sesiojn kaj parolis kun 11 geonkloj. Mi vere admiras ilin - ĉiuj geonkloj estis ege afablaj kaj ĉiuj sesioj estis ege interesaj. Ni havis vere inspirantajn konversaciojn kaj mi ricevis tre utilajn konsilojn, kiel lerni plu. Estis ĉiam honoro por mi paroli kun spertaj gefakuloj. Mi estas feliĉa, ke mi havis mian unuan sesion kun onklo sinjoro Mikaelo Ĉertilov kaj tuj sentis lian bonhumoran kaj saĝan subtenon. Estas tre malĝoje, ke neniam novaj genevoj havos tiun eblon...

Ĉiu scias, ke projektoj ne mem ekekestas. Devas esti homoj, kiuj komencas ilin kaj gvidas ilin, zorgas pri ili, kontribuas al ilia sukceso kaj sentas respondecon por ili. Ĉi-loke mi vere volas danki al vi, Katalin. Grandiozan laboran vi faras. Neniu povas fari ĝin pli bone ol vi. Eĉ nokte vi estas ensalutanta kaj zorgas pri ni!

Do, elĉerpiĝis miaj sesioj, sed mi nepre daŭrigos lernadon.

Mi deziras al vi kaj al ĉiuj kontribuantoj sukceson kaj feliĉon!

Amike,

Piret (Luule)

El la landoj kaj sekcioj...

Barato

Ŝancoj por ILEI en Barato



ILEI havas ok sekciojn tra Azio, ja tri el ili organizis Konferencojn aŭ Kongresojn de la Ligo. Sekcioj funkcias en Barato (Hinda Unio), Ĉinio, Irano, Japanio, Korea Resp., Mongolio, Nepalo kaj Vjenamio. Ĝi havas reprezentantojn en Pakistano kaj Tajvano (Ĉinio) kaj kontaktpersonon en Srilanko.

Ĉinio iĝis gravega movada lando kaj por ILEI kaj por UEA. En Azio, granda lando kun eksploda ekonomia kresko estas Barato (Hinda Unio). Sekve de la 4a Sud-Azia Seminario (SAS) antaŭ du jaroj, kie partoprenis la prezidanto de ILEI, la floranta ekonomio samtempas kun la reaktivigo de FEB, la Landa Asocio de UEA en tiu landego, kiu ene de kelkaj jaroj iĝos la lando kun la plej multaj loĝantoj en la mondo kaj kun la plej alta ekonomia kresko (nun ĉ. 6%).

Post multjara paŭzo sen kongresoj, la Barata Esperanto-Kongreso (BEK 18) okazis en decembro 2018 en la urbo Puneo. Ene de BEK 18 oni aprobis la elekton de ses-persona Estraro, kiu transprenas la regadon de la tri-persona laborgrupo starigita en la 4a SAS: Prezidanto: d-ro RANGANAYAKULU „Ranga”, Hyderabad; Vicprezidanto: d-rino Mina DAN „Mina” Kolkata; Ĝenerala Sekretario: s-ro KOTHA Naga Siva „Siva”, Puneo; Kasisto: s-ino Kirti Krishna RATNOO „Kirti”, Dhamtari.

Dudek esperantistoj el 4 landoj partoprenis en la Kongreso: Aldone al baratanoj partoprenis aktivuloj el Usono/Nederlando, Ukrainio kaj Uzbekio. La kongreso havis la benon de pioniraj esperantistoj – la antaŭa prezidanto, d-ro Abdul Salam vivas en Puneo kaj partoprenis en la kultura vespero. Same kiel por SAS-4, s-ro Juny WILFRED desegnis la emblemon kaj banderolon por BEK 18.

Dum la inaŭguro, s-ro Giridhar RAO (la sekciestro de ILEI) bonvenigis la kongresanojn kaj klarigis la kongresan temon, ‘Barato 19: taskoj kaj defio’. Estis anoncita 12-membra Komitato de FEB. Giridhar klarigis la konsiston de la Komitatoj: kun klopodo trovi ekvilibron inter la regionoj de la lando, inter viroj kaj virinoj, kaj inter



BEK 18 Puneo

novaj kaj spertaj esperantistoj. Estas kluboj en Bengaluro, Mumbajo kaj Puneo, kun aktivuloj en Vatsapa (*What's Up*) kontakto en i.a Kolkato, Ĉenajo, Dhamatri kaj Shillong.

Okazis la 53-a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO); uzita leciono de la vidbenda-kurso *Pasporto al la tuta mondo*. Precipe la komencantoj ŝatis la vidbendon kaj la klarigojn. Sekvis diskuto pri ebloj por konsciigo, kapabligo kaj kunordigo de Esperanto en Barato. Inter la prioritatoj estas la evoluigo de interaktiva ligilo por instruistoj tra la landego.

Ĵurnalistoj fotis kaj intervjuis la kongresanojn; aperis artikolo en la ĵurnalo *Hindustan Times*, renoma ĵurnalo kun preskaŭ miliono da abonantoj – kun pliaj milionoj rigardantaj la elektronikan version. Vidu la novan retejon de FEB kun pli plena raporto pri la kongreso:

<https://baratejo.wordpress.com/bek18raporto/>

Stefan MACGILL

Brazilo

I Seminario por esperantistaj kursgvidantoj

De la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 2018 okazis en Olinda, Pernambuko, Brazilo, la I Seminario por Esperantistaj Kursgvidantoj organizita de la brazila sekcio de ILEI kaj la *Instituto Plurkultura Saluton* (Instituto Multicultural Saluton – IMS), NeRegistara Organizaĵo, kies celo estas diskonigi Esperanton flanke de sociaj kaj kulturaj eventoj en nia regiono.

La aranĝo havis apogon de ILEI, de Alagoana Asocio de Esperanto kaj de kelkaj samideanoj. La patrono de la I Seminario estis la D-ro Profesoro José Passini, eksprezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo kaj eksrektoro de la Federa Universitato de Juiz de Fora – UFJF/MG, kie li instruis lingvistikon, Esperanton kaj la Italan lingvon dum multaj jaroj.

Dum la evento, kursgvidantoj el 3 nordorientaj ŝtatoj nome Pernambuko, Alagoas kaj Paraíba el la urboj Caruaru, Olinda, Paulista, Recife, Toritama, Arapiraca, Maceió kaj João Pessoa kunsidis por diskuti la instruadon de la internacia lingvo kaj partopreni en diversaj prelegoj.

Pri la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj la brazila sekcio prelegis la ILEI-sekciestro, vendrede vespere, dum la malferma ceremonio. Li parolis pri kio estas ILEI kaj ĝiaj celoj kaj agadoj. Krome, li legis la salutmesaĝon de la ILEI-prezidantino Mireille Grosjean.

Prelegoj pri instruado de fremdaj lingvoj kiel la franca kaj la angla malfermis la laborojn de la sekva tago. Ankoraŭ dum la sabata mateno ni havis la oportanon lerni iom pri la diversaj metodoj por instruado de Esperanto. Posttagmeze ni havis la brilan prezenton pri RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado), klarigojn pri la Cseh-metodo kaj la debaton, kiu alportis

kelkajn decidojn: 1. okazigi novan seminarion venontjare; 2. startigi agadojn por la komencintoj, kiel kursojn aŭ konversaciajn rondojn, k.m.a; 3. daŭrigi la KER-ekzamensesiojn, kiuj jam okazas ekde 2013 en la brazila nordoriento; 4. instigi pli oftajn kontaktojn inter niaj kursgvidantoj per vatsapo (whatsapp) aŭ per hangout aŭ skajpo; kaj 5. okazigi E-kursojn, kies celo estas prepari niajn kursanojn por trapasi la KER-ekzamenojn.

Antaŭ la fermo de la seminario ni enmanigis la atestilojn al la 4 sukcesintoj de la pasinta 7-a Tutmonda Ekzamentago, okazinta en Recife kaj ni lotumis kelkajn Esperantajn librojn. Por fini la tagon, regalis nin la muzika prezentaĵo de loka grupo, kiu kantigis kaj dancigis ĉiujn ĉeestantojn. La dimanĉo estis libera tago por promenado en la bela naturo de la gastiganta ŝtato Pernambuko.

*Aristóphio ALVES FILHO. ILEI-sekciestro en Brazilo,
esperantomaceio@yahoo.com.br, <http://www.facebook.com/ILEIenBrazilo>*

Ĉinio

Pri la Sesa Esperanto-Semajno en la lernejo Baiyangshujie



La ĉina elementa lernejo Baiyangshujie en urbo Taiyuan de Shanxi-Provinco jam de 10 jaroj organizas kursojn de Esperanto por preskaŭ 400 gestudentoj, kiuj aĝas inter 6 kaj 12 jarojn. Iuj el la plej grandaj lernantoj jam sufiĉe flue parolas kaj eĉ engaĝiĝas en ĉiutaga radia disaŭdigo en Esperanto. Kelkaj el ili jam partoprenis en la UK de Koreio. Por festi la specialan lokon, kiun Esperanto ĝuas en la eduka filozofio de la lernejo dank'al sia monda vido, la naskiĝdato de Zamenhof iĝis tuta semajno de spektaklaj kaj interesaj Esperanto-aranĝoj. Tiom granda estas la entuziasmo pri la afero, ke eĉ la vicestrino de la lernejo kaj kelkaj el la gepatroj decidis eklerni la lingvon, tiel

profundigante ĝiajn radikojn en la loka situacio kaj helpante ĝian disvolvigon.

La multaj ĉinaj kaj eksterlandaj gastoj, kiuj venas por la festo, ne povas ne miri pri la ĝojo, kun kiu la gelernantoj pretas levi siajn manojn kaj volontulas respondi dum Esperantaj lecionoj. Tiu deziro aktive partopreni aperas eĉ okaze de tute novaj temoj, montrante la kuraĝon mem-pensi kaj klopodi lerni. La instruistinoj helpas krei tiun etoson de komuna fido, ĉar ili tute bone regas la klasojn, kuraĝigante la gelernantojn kaj ĉiam proponante al ili ludojn kaj kantojn por varii la ritmon de la leciono en maniero taŭga al ilia aĝo. La lernejo klopodas kunligi en sia instruado „ĉinan koron”, per kiu la gelernantoj funde ekscias la belecojn de ĉina kulturo, kaj „mondan okulon”, pere de kiu ili povas larĝigi sian pensmanieron jam en frua aĝo. Kiel unu el la verdaj standardoj dum la ceremonio oni recitis, fakte, „Esperanto ne estas nur lingvo.”

Alessandra MADELLA

Hungario

KER - provokzameno en la lernejo LINGVO-Studio

29 personoj kaptis la okazon mezuri sian lingvoscion en la prov-sesio de la ŝtata lingvokzameno KER en LINGVO-Studio, la lingvolernejo de Szilvási László.

En tri lernoĉambroj solvis la taskojn 27 personoj por la mezgrada nivelo, kaj la instruista ĉambro estis uzata por la ekzamenoj de la supera grado.



Taskofolioj de la partoprenantoj estos korektitaj de la membroj de la ekzamena centro OIK, la rezulton ĉiu ricevos en persona retmesaĝo.

Ĉiu partoprenanto de la prov-sesio ricevis donace la du-voluman kolekton de Esperantaj noveloj „Trezoro”, kaj en la fino oni povis malstreĉiĝi per glaso da ĉampano kaj komuna babilado....

Estis bona sento vidi kune tiom multe da hungaraj esperantistoj...

SZILVÁSI László

Turkio

Jen iomete pri la 2018 movado en Turkujo kaj pri Esperanto-instruado

La Esperanto-movado en Turkujo estas tre malforta kaj ankaŭ ne ekzistas asocio. Tamen ĉijare ni atingis kelkajn sukcespunktojn. En la kursoj ni kutimas uzi la libron de Stano Marček, „Esperanto per Rekta Metodo”. Kaj kelkfoje al adoleskantoj, kiuj parolas fremdan lingvon, ni instruas pere de la 16 reguloj de la Unua Libro. ► <https://goo.gl/do1XRL>

Januare Vasil Kadifeli faris enkondukon al Esperanto kaj 4-horan kurson al lernantoj de Avcılar Anadolu Yazılım Lisesi. ► <https://goo.gl/kbezso>
► <https://goo.gl/QQinpy>

Murat Özdizdar ĉiujare organizas Esperanto-klubon en sia lernejo kaj instruas daŭre preskaŭ 6-8 lernantojn.

Murat Özdizdar organizis pagatan kurson en la *Sciencfikcia Biblioteko Özgen Berkol Doğan* al 8-10 adoleskantoj kaj ili lernis ĝis la duono de la libro.

Vasil Kadifeli organizis kurson en *Çırac Atölye* kaj en 13 x 2-horaj lecionoj li instruis la tutan libron. Antaŭ la kurso la 15-an de decembro en la sama loko ni faris enkondukon al Esperanto kaj instruis rapide pere de la 16 reguloj. ► <https://goo.gl/wJx14C>

Vasil Kadifeli septembre en la kultura centro de Büyükada insulo faris enkondukon al Esperanto kaj instruis pere de la 16 reguloj. ► <https://goo.gl/dWgJoK>

La 15-an de decembro en *Işık ve Gölge Okuma Evi* biblioteko ni organizis tutagan feston (*vd foton*) por la Z-Tago, en kiu ni ankaŭ faris enkondukon al EO kaj instruis pere de la 16 reguloj. Partoprenis preskaŭ 25 homoj el kiuj 10 estis jam esperantistoj de ĉiu nivelo kaj 3 venis el ekster Istanbul. ► <https://goo.gl/ximjAN> ► <https://goo.gl/ksTxse>

Ege Madra ankaŭ parolis pri nia nova reta vortaro, kiun li mem programis.

► <https://goo.gl/gmT9K6> ► <https://tr-vortaro.info/#/>



Antaŭ la Z-Tago, loka gazeto interesiĝis pri nia evento kaj ni sukcesis aperigi informadon pri Esperanto kaj papere kaj rete: ► <https://goo.gl/iqtxfn>
 Vasil Kadifeli kun Ege Madra kaj Fatma Eroĝlan tradukis la malnovan usonan kurson: „Free Esperanto Course” al la turka kaj provis instrui pere de ĝi. Ĝis nun ni sukcesis doni nur unu atestilon, ĉar lernantoj kutime forlasas la kurson frue. ► <https://goo.gl/fAYKrQ> ► <https://goo.gl/b9ZyZi>
 Ni varbas esperantistojn pere de nia facebook-a grupo **Esperanto Türkiye** kaj niaj aliaj retejoj, eventoj kaj kursoj helpas al tio. Ni havas ankaŭ alian fermitan grupon en facebook-o, kie oni lernas mem, sed povas demandi ion ajn pri la lingvo. La movado ĉefe estas en Istanbul, tamen la aliajn partojn de la lando ni provas atingi pere de la reto. ► <https://goo.gl/RjwLGB>
 ► <https://goo.gl/x5kNg7>

La revuo Turka Stelo nun havas 338 abonantojn kaj multajn kontribuantojn el diversaj landoj tra la mondo, sed bedaŭrinde turkoj ne tiel multe legas kaj ne verkas. La februara numero estos la 38-a. La revuo estas liverata elektronike en „pdf”, „ePub” kaj „mobi” formatoj.

► <https://goo.gl/4G2Fpr>

Vasil Kadifeli provas traduki kaj konatigi la turkan kulturon al fremdaj esperantistoj. Ni prezentas tiujn tradukaĵojn en la Kultura Paĝo de nia retejo. Helpis unufoje ankaŭ Fatma Eroĝlan kaj Başak Aray. Ni invitas vin legi la tradukaĵojn. ► <https://goo.gl/WdAQow>

Preparis Vasil KADIFELI (Istanbul, Turkujo)

La 52-a Kongreso: feste, fake kaj distre

La 52-a kongreso de ILEI, 13 – 20 julio 2019, koincidas aŭ proksimas kun tri gravaj eventoj de Esperantujo kaj de la mondo ĝenerale:

- ILEI, fondita en la jaro 1949, aĝos 70 jarojn en la monato de sia ĉi-jara kongreso.
- La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ĵus atingis sian 70-jariĝon en decembro. La homaj rajtoj estas en la kerno de lingva kaj eduka politiko de ILEI.
- UN deklaris la jaron 2019 *Internacia Jaro de Indiĝenaj lingvoj*. Jen plia motivo por plifortigo de la aktiveco de ILEI en la sfero de lingvaj homaj rajtoj.



Artistoj de la infana folklorgrupo "Bambi" dancos en la Nacia Vespero

Pro ĉio ĉi la kongresa programo havos festan etoson. Porokazaj prelegoj, artprogrameroj, diskutrondoj, lingva festivalo kaj aliaj konvenaĵoj solenos la datrevenon kaj la indiĝenajn lingvajn rajtojn. La tradicia faka programo disvolviĝos ĉirkaŭ la kongresa ĉeftemo *Lernado en virtualaj komunumoj*, kiu

inkluzivos ankaŭ subtemojn pri parolkomunumoj kaj lernado de indiĝenaj lingvoj.

Konferenco pri *Lernado en virtualaj komunumoj*

Tiu konferenco okazos enkadre de la kongresa programo la lastajn du labortagojn (jaŭdon kaj vendredon, 18-19 julio). Kunorganizanto, krom ILEI, estas la Fakultato de Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak, en kies ejoj okazos ne nur la dutaga konferenco, sed la tutsemajna kongreso. Krom provizo de spacaj kaj teknikaj bezonoj, la *Fakultato* tra siaj komunikkanaloj kaj organizaj rilatoj entreprenos paŝojn por:

- Enskribigi la eventon en la registron de *Edukministerio de Serbio* kiel internacian konferencon donantan al siaj partoprenantoj certajn poentojn por avanco en la universitata kariero.
- Proponi al la *Serbia Instituto pri Progreso de Edukado* rekonii ĝin kiel seminarion por mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj, kiuj bezonas partoprenon en fakaj seminarioj por pluvalidigo de la instruista licenco.
- Inviti kompetentajn universitatanojn el internacia universitata medio partopreni en la Programkomitato. ILEI, siaflanke, invitas esperantistajn kompetentulojn.
- Varbi neesperantistajn partoprenantojn ĉu kiel prelegantojn ĉu kiel aŭskultantojn.



"Ĉaĉanska Lira" (Liro de Ĉaĉak) kantas serbajn kantojn en Esperanto

Tio, interalie, donos ekstermovadan institucion subtenon al la popularigado de Esperanto inter universitataj, mezlernejaj kaj bazlernejaj instruistoj en Serbio. Laborlingvoj de la dutaga konferenco estos Esperanto, la serba kaj la angla.

La konferenco traktos jenajn kaj ne nur tiujn subtemojn de la ĉeftemo:

- Lernkomunumoj en virtuala medio
- Scikreado en retaj lernkomunumoj
- Iloj kaj procedoj por lernado en virtuala medio
- Lingvolernado en virtualaj komunumoj
- Virtualaj komunumoj de indiĝenaj lingvoj
- Lernado de indiĝenaj lingvoj en virtuala medio
- Kondutmodeloj kaj normoj en virtualaj lernkomunumoj
- Retkomunumoj bazitaj sur retejoj de sociaj amaskomunikiloj
- Sociemo en sociaj retspacoj

Se vi deziras partopreni, bonvolu aliĝi per retaliĝilo

<https://goo.gl/forms/TOrY5bltJtK0BKεG2>

kaj sendi vian prelegproponon al ilei.kongresoj@gmail.com plej laste ĝis la 10-a de majo 2019 en jena formo:

Via prelegtitolo

Via plena nomo, Via institucio (ILEI, AIS, Universitato de ... , aŭ simile)

Resumo: Por resumi vian prelegon bonvolu uzi 100 - 200 vortojn.

Ŝlosilvortoj: (3 - 5 ŝlosilvortoj)

Aŭtoro: Por prezenti vin kiel aŭtoron bonvolu uzi maksimume 150 vortojn. Via preskvalita foto estu aldonita en aparta dosiero.

Se la Programkomitato aprobos vian prelegon, ĝi estos en tiu formo prezentita en la *Kongreslibro* kaj vi ricevos klarigon por livero de la plena prelegteksto.

La cetera faka kaj kleriga programo

Ĝi konsistos, jam laŭtradicie, el: programeroj proponitaj de kongresanoj (prelegoj, diskutrondoj, atelieroj, spert-interŝanĝoj), instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, ekspresa kurso de la loka lingvo („serba eksprese”), pedagogia foiro kun interkonsiliĝo de E-centroj, lingva festivalo.

Se vi deziras prelegi en ĝenerala kongresa programo (ne specife en la konferenco pri la kongresa temo), bonvolu sendi vian prelegproponon al ilei.kongresoj@gmail.com ĝis la fino de majo en la sama ĉi-supre montrita formo. Se vi havas alian kontribuproponon por la kongresa programo (ekz. diskutrondo, sceneja programero, libroprezento k.c.), bonvolu sendi ĝin ĝis la fino de majo al la sama adreso en jena formo:

Titolo de via programero

Via plena nomo, Via institucio (ILEI, AIS, Universitato de ... , aŭ simile)

Tipo: Per maksimume 10 vortoj priskribu tipon de la programero, kiun vi proponas, ekzemple: ateliero, diskutrondo, kurso, sceneja programero, ekspozicio, libroprezento, kvizo, aŭkcio, sporta programero, prelego kun ekspozicio kaj diskuto, k.s.

Priskribo: Ĉi tiu modelo difinas strukturon kaj enhavon de kongresaj programproponoj. Por priskribi la proponatan programeron bonvolu uzi 100 - 200 vortojn.

Celgrupo: Kiun vi deziras en la publiko aŭ partoprenantaro de via programero? Ekzemple: ĝenerala kongresa publiko, komencantoj, progresantoj, instruemuloj, infanoj, junuloj 15-30-jaraĝaj, ŝatantoj de beletro, sportemuloj, ekstera publiko neesperantista k.s.

Bezonoj: Bezonataj tempo, ejo, rimedoj, helpantoj.

Proponanto: Por prezenti vin kiel proponanton / gvidonton bonvolu uzi maksimume 150 vortojn kaj sendi preskvalitan foton en aparta dosiero.

Tiel vi ebligas al LKK adekvate plani la tempon, spacon kaj aliajn bezonojn por via programero kaj prezenti ĝin en la *Kongreslibro*.

Se vi deziras mem trejniĝi kaj lerni, skribu al ilei.kongresoj@gmail.com pri kio interesas vin, por ke LKK laŭeble planu tion en la kleriga programo. ILEI-estraro kaj LKK precipe kuraĝigas vin organizi kaj venigi grupojn de komencantoj el via urbo aŭ lando por lerni en dumkongresaj kursoj kun internaciaj E-instruistoj, en aŭtentika E-movada etoso, ĝuante ankaŭ la distran kaj turisman programon de la kongreso. Venu ankaŭ kun infanoj, ĉu viaj propraj ĉu kursanoj de infana E-kurso. LKK organizos programon por ili en la formo de *Infana universitato*.

Por ĉio ĉi, aŭ se vi havas por la *pedagogia fiaro* eksponaĵojn (lerniloj, instruhelpiloj, varbiloj, libroj, gazetoj k.c.), prezentaĵon aŭ prelegon, se vi deziras prezenti viajn E-pedagogiajn spertojn kaj oferton de via E-centro, aŭ instrueti vian lingvon sed ne jam partoprenis en *lingva festivalo* de ILEI, se vi kunportos vendaĵojn por la libroservo, se interesas vin aliaj demandoj, kiujn ne eblas sufiĉe trakti tra la aliĝilo, skribu al la donita adreso por

interkonsenti kaj plifaciligi viajn preparadojn kaj partoprenon, kaj helpi la organizan laboron de LKK.

La kultur-arta, distra kaj turisma programo

Ankaŭ ĉi-jare ne mankos ekskursoj kaj la tradiciaj distraj vesperoj: interkona, nacia, internacia, muzika, bankeda adiaŭa, sed estos ankaŭ io nova. Pliaj informoj venos kun novaj prikongresaj komunikoj en venonta numero de IPR aŭ tra aliaj komunikkanaloj. Por nun nur kelkaj detaloj:

- Ne forgesu kunporti gastronomiajn specialaĵojn el via regiono por la *interkona frandvespero*.
- Pretigu vin por demonstri viajn muzikajn, dancajn, aktorajn lertojn kaj prezenti erojn el via kulturo en la *internacia vespero*. Laŭeble kunportu vian muzikilon. Skribu anticipe pri la programeroj, kiujn vi proponas.
- Se interesas vin komuna legado en *literatura kafejo*, kunportu vian ŝatatan pecon el la originala E-literaturo, aŭ esperantigitan el via nacia beletro, por legi kaj pridiskuti ĝin kun aliaj interesatoj.
- LKK interkonsentis kun loka virina kantgrupo „Ĉaĉanska lira” (Liro de Ĉaĉak) pri ilia kontribuo al la *nacia vespero* kaj distraj programeroj.
- Alia loka kontribuanto estos la infana folkloro grupo “Bambi”, tre populara en la urbo kaj lando.
- Kontaktoj daŭras kun aliaj esperantistaj kaj neesperantistaj kontribuontoj al la kulturata programo.
- Por la turisma programo, krom la dumkongresaj tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj, LKK kaj *Turisma Organizaĵo* de Ĉaĉak proponas al kongresanoj veni en Serbion tri tagojn antaŭ la kongreso kaj/aŭ resti tri tagojn poste (se vi ne hastos al Finnlando por UK) por ekkoni iom pli da kongreslando ekster la kongresurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, inkluzive la ĉefurbon Beogradon kaj vidindaĵojn ĉirkaŭvoje al kaj el Ĉaĉak.

Bonvenon!

Radojica PETROVIĆ, Estrarano pri Kongresoj

La sekiestroj kaj reprezentantoj pensu plenumi sian devon: raporti al la Ligo. Modelo de raporto troviĝas sur la ĉefpaĝo de www.ilei.info.

La estraro dankas al ili.

La sekcioj povas proponi novajn Honorajn Membrojn, elektotajn de la Komitato. Bonvole legu la prian regularon tie:

<http://www.ilei.info/dok/index.php?lingvo=eo>

La ĉefaj EO-eventoj de la jaro 2019

Kompreneble ni citu unue la **ILEI-KONGRESON EN ĈAĈAK, SERBIO**, de la 13-a ĝis la 20-a de julio. Vidu paĝon... de IPR. Vidu www.ilei.info Tie la 70-jariĝo de la Ligo ILEI estos digne celebrata.

Universala Kongreso (UK) de UEA en Lahtio, Finnlando, de la 20-a ĝis la 27-a de julio. Vidu www.uea.org Okazos elektoj, la Asocio ricevos novan estraron. Belega regiono, bunta programo.

La Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK) okazas dum UK rande de Lahti.

La organiza skipo komunikas: IIK atendas infanojn kaj junulojn de ĉiu aĝo.

Vidu retejon: bertosch.free.fr/iik2019

Vidu fotojn de la IIK-ejo: <http://bertosch.free.fr/iik2019/fotoj.htm>

Ni serĉas pli da IIK-kungvidantoj, ekzemple junan skolton, sport-instruiston, savnaĝiston, iun kiu konas multajn grup-ludojn interne kaj ekstere.

Tro junan infanon akompanas gepatro. Gepatroj povas dormi en la IIKejo kaj tage partopreni UK-on.

Se vi (gepatroj) ne iros al UK, sed viaj gefiloj volus veni al IIK, tiam ni provos organizi, ke alia e-isto el via lando akompanos viajn gefilojn al Lahti.

Se la dato en julio ne taŭgas, venu aŭguste al infana-familia renkonto en Francio gresillon.org/s4.

Bv. respondu al: infana.kongreseto@gmail.com. Kore salutas la teamo de IIK 2019.

Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Liptovsky Hradok, Slovakio, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto. La plej granda kaj vasta junulara aranĝo plensemajna. Vd. <https://www.tejo.org/cause/internacia-junulara-kongreso/>

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire, Marie-Sylvie Julian, Emmanuel Desbrières**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj 32 EUR kaj por B-

landanoj 18 EUR. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna Amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Nova peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) kiu zorgos pri vidhandikapitaj membroj de ILEI kaj abonantoj de la tekstaj versioj *IPR* kaj *JA*, estas Vjaĉeslav Suslov, rete: gloro59@yandex.ru. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2019,
redaktfino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2019.**

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
bselimi@gmail.com

Armenio: Lida ELBAKJAN,
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-
375062 Erevan,
Lidaelb@yahoo.com

Aŭstralio: vakas

Barato: Arikapalli Giridhar
RAO, E 14 Good Earth Malhar
Mosaic, Kambipura, Kengeri
Hobli, Bengaluru 560060, India,
rao.giridhar@apu.edu.in

Belgio: Marc CUFFEZ,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme
Charles, 04BP0672
BJ-Cotonou, Rep du Benin,
alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Aristophio Andrade
ALVES FILHO,
Rua B-55, Nº 85, Conj. B.
Bentes 1, Q. B-55, Benedito
Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-
57085-748,
esperantomaceio@yahoo.com.br

Bulgario: Mariana
GENCHEVA, Targovska 95,
BG-5180 Polski Trambesh,
maries972@yahoo.com

Burundo: Evariste
BIGIRIMANA, BP 170, BI-
Rumonge-Burundi,
bigevariste@gmail.com

Ĉeĥio: Jana
MELICHÁRKOVÁ, U Hřiště
398, CZ - 696 06 Vacenovice.
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: WEI Yiubin „Jado”
Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan
Shanxi, CN-030003,
ilei_cxinio@163.com

Danio: Ileana SCHRØDER,
Vestavej 4, DK-2770 Kastrup,
ileana.schroder@mail.dk

Finnlando: Sylvia
HÄMÄLÄINEN,
F.E. Sillanpään katu 2 C 46,
FI-33230 Tampere,
sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel DECHY, 65
allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÓRÓDY,
Esperanto-Centro,
Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsafia.korody@esperanto.de

Hispanio: Luis Eduardo
BERDOR REMON, Pablo
Iglesias 41, 4 B,
ES-50018 Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Hungario: József NÉMETH,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozefo.nemeth@gmail.com

Irano: Ahmad Reza
MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh.
Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-
Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi,
IR-19166-13514 Tehran,
mamduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43122 Parma,
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: ISIKAWA Tiekō,
Tate 1-6-6-103, JP-353-0006
Siki-si, Saitama-ken,
tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp

Katalunio: Rubén
FERNÁNDEZ ASENSIO.
C/ Latrilla 12, 1r 2a, ES-08912
Badalona, *ileicat@hotmail.com*

Kongo DR: MAFUILA
MAVOMO Jackson,
C/O DKEA, BP 1007 Kin
Limete Congo RDC,
mavomespero@gmail.com

Korea Resp.: PARK
Yongsung, 402-dong 1803-ho,
Hansol-Solpark Apt. 218
Samkye-ro, Gimhae-si,
Gyeongsangnam-do, KR-50887,
esabpark@korea.com

Kroatio/KEL: Marija
JERKOVIĆ, Jarunska 6,
HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana
AKIK, Franje Malnara 52,
HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr

Kubo: Gonzalo
COLLANTES GARCIA,
N.López 857(altos) e/ Barnada y
S.Lora.
CU-90100, Santiago de Cuba
eduardo.robert@infomed.sld.cu

Meksiko: Carlos
HERNÁNDEZ LOARCA, Arco
del Triunfo 2019-40 San Pedrito
los Arcos,
MX-76148 Querétaro México,
ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo
TSERENDEJID, MN-
Ulanbatoro, distrikto BZD, 82-5,
tserenjd@yaho.com

Nederlando: Robert
MOERBEEK,
Zwaansmeerstraat 48,
NL-1946 AE Beverwijk,
moerbeekr@gmail.com

Nepalo: Bharat Kumar
GHIMIRE, Nepala Esperanto-
Asocio, G.P.O. Box 10518,
Kathmandu,
nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin
BONDHUS, Morenefaret 8A,
NO-4340 Bryne,
akbondhus@jkn.no

Pollando: Magdalena
TATARA, ul. Grzegórzecka
74/4, PL-31-559 Kraków,
mtatara@gmail.com

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str.
Principală, Bl.1 Ap.3, RO-
527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifoii@yahoo.com

Senegalo: Assane FAYE, BP 1186 Rufisque, Senegal, damanemanu2000@yahoo.fr

Serbio: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape Town, emalandan@yahoo.fr

Svedio: Agneta EMANUELSSON, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Charles RODUIT, rue de Chancheri 1, CH-1661 Le Paquier, charles.rodut@gmail.com

Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzania. Poŝtel: +255786 819 767, +255758 176 722, mulelebassa@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMADON B., Mensah, B.P. 39, Aneho, TG-Lomé, abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucjk

Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, wb_harris@hotmail.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP, 70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN-Hanoi, Ngyuennepa9cfl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Britio: Elizabeth STANLEY, Frome House, Frome Gardens, Stroud, Glos. GL5 4LE, UK, elistaros@hotmail.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ, Casilla 903, CL-3340000 Curico, hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box TS 404, Teshie, GH-Accra, ctreg@gmail.com

Islando: Loftur MELBERG Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997, luizacarol1947@gmail.com

Niĝerlando: BOUKARI Ellias Illiassou, S/C de Kanguéy BP11936 Niamey, Niger, elliasdj@gmail.com

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, adeelbutt84@gmail.com

Rusio: Svetlana SMETANINA, str. Budajskaja 13-35, RU-129128 Moskvo, svsmetanina@yandex.ru

Slovakio: vakas
Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, rezamenhof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique WAGNER, Misiones 1421, AR-3116 Crespo - Entre Rios, gwagner@digitaloffice.com.ar

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, esperanto@chello.at

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle María Estívariz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta KULENOVIĆ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Haitio: Christine THEANO, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA, Chemomi Estate, P.O. Box 22, 30301, Nandi Hills, simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com

Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, grazopol@yahoo.com

Luksemburgo: Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, moonmoni@pt.lu

Nikaragvo: Uriel GURDIAN, Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia adventista 1c O, 1c N. Casa G-32, Managua, Nicaragua, esperantonica@gmail.com

Portugalio: Luís LADEIRA, Rua Manuel Valadares, 10, 2E PT-2650-192 Amadora luisladeir@gmail.com

Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, peter.grbec@gmail.com

Srilanko: U.L.F.G.Zeiter PERERA.197, Indivitiya Road, Hettigama, Jaela, Srilanka, zeiter.espero@gmail.com

Taĝikio: Firdaus SHUKUROV, Glavpochtamt, a.k. 135 TJ-734000 Dushanbe, komintel@yandex.ru; aet2005@yandex.ru

Turkio: Vasil KADIFELI, Ataturk mah. Turgut Ozal blv. Gardenya 2-1 D:21 Atasehir 34758 Istanbul/Turkey, vasilkadifeli@gmail.com

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Ricardo Coutinho, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE, venesperanto@cantv.net

Per viaj donacoj vi povas subteni la agadon de la Ligo. La UEA-konto de ILEI estas ilek-a. La diversaj fondaĵoj de ILEI aperas tie: www.ilei.info/instancoj/fondajhoj.php

